

FENIKSO



INFORMILO POR

AMIKA
RONDO DE
ESPERANTAĜ-
KOLEKTANTOJ



Redaktas: R. Jensen, Sdr. Ringg. 77, DK-8000. Århus C

Nr. 13. 15. 1. 1971.

Tria jaro nr. 1

Maloftaj Glumarkoj

Estas ja mia intenco iom post iom preparoli kaj eble montri bildojn de glumarkoj, kiuj ne nur estas sufiĉe maloftaj, sed, pri kiuj oni tiamaniere povas klarigi pli detale diversajn diferencojn kaj variaĵojn.

Por efektivigo de tiu plano mi petas kunlaboron de niaj AREKANOJ. Se vi deziras koni pli detalojn de certaj glumarkoj ol menciita en la katalogo, bonvolu demandi min. Kaj se vi posedas maloftajn - novajn aŭ malnovajn glumarkojn pri kiuj vi opinias, ke estus interesa por la membraro aŭdi ion, bonvolu priskribi ilin (aŭ prunti ilin al mi), kaj mi post tio eble faros noticon en la informilo. Kompreneble pruntita materialo ĉiam estos resendota kun danko post la uzo.

Ĉifoje mi elektis por preparolo markojn eldonitajn en 1920 je la unua diskutanta kunveno de iberiaj Esperantistoj en Barcelona.

En tiu tempo oni malavare eldonis multajn

glumarkojn je Esperanto-okazaĵoj, - speciale en Hispanio, - la lando kiu, certe ne nur tiam sed ĉiam, havis la mondrekordon pri elsendo de Esperantomarkoj.

En Barcelona en 1920 estis samtempe kun la unua diskutanta kunveno okazita granda Esperantoekspeziĉio. Por tiuj 2 okazaĵoj estis eldonita markofolio kun 20 diversbildaj markoj, 10 por la ekspozicio kaj 10 por la kunveno, en 10 koloroj, dentitaj kaj nedentitaj. Do, entute 400 diversaj markoj. Oni devas diri, ke iline ŝparis je reklamo tiutempe. Tiuj markoj havas numeron 87 en la katalogo, kaj kompreneble ili hodiaŭ estas tre maloftaj.

Sed estis ja ankaŭ eldonita markoj speciale por la kunveno en alia desegno, kaj laŭ la teksto ĝi estis eldonita de la "FAJRO" ORGANIZA KOMITATO F.O.K.



Kaj estas tiu fakto, kiun mi prenis kiel motivo por ĉi tiu notico. Oni povus ja de tiu formo por titulado de si mem vidi specon de troigita memkontento kaj fiereco pri propra agado. La komitato eĉ fajras pro sia arda intereso.

Ĉu tio estas ĝusta, mi ne scias, sed eble oni tamen diskutis tion post la apero de la markoj, - ĉar sur la preskliŝo oni pli poste forskrapis la fieran esprimojn pri la "fajrado": FAJRO kaj F.O.K. tiel ke nur restis la simplaj vortoj: Organiza Komitato.

La marko (kat. nr. 88) laŭ tio ekzistas en 2 variaĵoj: kun aŭ sen "FAJRO".

Laŭ Takács la sambildaj markoj venis en kvar div. formatoj en tri koloroj, entute 12 markoj. Persone mi nur konas 3 formatojn (vidu la katalogon). Ĉu la kvara ankoraŭ ekzistas ie?

Reinhold Jensen

---o00o---

STAMPOJ



Variaĵoj de la sta. "Paris invitas vin 1937".

La menciita variaĵo, kiun s-ro Burmeister lastfoje preparolis, certe montras la ekaperon de la difektigo. Ne ŝajnas al mi necese noti ĉiujn gradojn de la difektigo laŭlonge de la uzo. Se nepre necese, nur sufiĉus indiki la ekstremajn prezentojn, tio estas: antaŭ la ekdifektigo kaj je la lastaj tagoj de la uzo.

Jes, la rompigo de la kadro estas notinda, sed tamen ne ŝajnas al mi necese katalogi per malsamaj numeroj la kreskintajn gradojn de la difektigo.

Mi sugestas, ke post la regula stampo eta notico indiku ekzemple: En aŭgusto komencis difektigo de la stampilo. En la lasta tempo de

41° CONGRESSO ITALIANO
DI ESPERANTO



GALLERIA S. PIETRO
Via dei Corridori, 6
I 00193 ROMA Italia

Annullo Speciale - Special Cancellation
Spécialisation Spéciale - Sonderstempel - Speciale netige

la uzo mankis la maldekstraj anguloj de la kadro, kaj la lasta linio de la teksto ne plu estis bone legebla. Tamen la stampilo estis uzita ĝis la ekspozicio.

Amouroux

□□□□

E.-stampoj 1970. (Daŭrigo)

25) PALERMO. 41-a itala Esp.-kongreso.

La kongreso okazis en tagoj 19.-26./9 sur ŝipo, kiu vagis de haveno al haveno en la Mediteraneo. Mi vidis stampon de Palermo kun dato 24/9, sed ne scias precizan tagouzon, eble ili estis en tiu urbo nur dum tiu tago. Same mi ne scias, ĉu ekzistas aliaj stampoj de aliaj urboj sur la vojaĝ-vojo.

Informoj estas dezirataj.

Tichý

Danke al Amouroux mi povas montri bildon de tuta koverto kun tiu stampo. Red.

□□□□

Adressaĝoj:

9) Vladimír Váňa,
Kyjevská str. 108,
Plzeň. Ĉeĥoslovakio.

27) Jánis Rukšáns,
p. k. 441,
Riga C.
Latvio. U.S.S.R.

HHHH
QQQQ

GLUMARKOJ.

GLUMARKOJ 1970. (Daŭrigo)

- 15) Okaze de la 25-a jubileo de la Vjetnama Demokratia Respubliko, 2. 9. 1970, la Vjetnama pacdefenda Esperantista asocio eldonis 4 div. markojn. Trĉ. kaj ne-gum.
- a) (H)(68x42) Krom la teksto busto de la ŝtatestro Ho Tŝi Min antaŭ flago.
 - b) (V)(45x68) Krom la teksto bildo de la nacia emblemo.
ambaŭ:
 - 1) flava
 - 2) ruĝa (raportis: Mayer k. Burmeister)
- 16) AVA-Tb-markoj 1970. Vendrell, Hispanio. Kiel kutime tiu jara eldono aperis en terure multaj variaĵoj. Entute 300. Oni vere devas esperi ke la eldonintoj IAM mem povas kompreni, ke tio estas tiel granda troigo, ke ili ne daŭre povos kalkuli kun vendo al eksterlandaj kolektantoj. Teksto kaj bildo estas per la dentumigo dividita en 25 div. markoj de tre diversaj grandoj. La centra bildo montras la "sanktajn tri reĝojn" ekrajdante de la Cheops piramido en Egiptujo tra nokta pejzaĝo sub stelriĉa ĉielo, survoje al Betlehem. A.dent. kaj B. nedent.
- 1) blua
 - 2) verda
- sur paperoj:
- a) blanka, gumita
 - b) flaveta, ne-gumita
 - c) palruĝa, ne-gumita

Aĉetebraj ĉe Juan Ventoŝa, Mayor 1,
Baneras del Penadés (Tarragona) España.
Prezo: 2 am dolaroj. (korespondas angla)

17) Esperanto en Haarlem. (nedatita)(V)(23x35)
 fol. 5x4=20. A. nedent. B. strie trapikita
 C. dent. Unua 10 markoj montras la malno-
 van Amsterdaman pordegon. La malsupra deko
 montras grandan preĝejon. Nigra kaj blanka
 sur verda fono. Folioj kostas po 0,50 fl.
 (aldonu sendkostojn). Mendebla ĉe s-ro H.T.
 Menges, Godfr. v. Buillonstr. 59. Haarlem,
 Nederlando. (Giro: 40 92 48).

raportis: A. Lakemond

[REK]

"Reko-etikedo"

En Darmstadt (je la 14-a jarkunveno de GEFA)
 la poŝto uzis krom ilustrita stampo ankaŭ por-
 okazan R-etikedon por la sendo de registritaj
 aĵoj. Tiu etikedo sur koverto aŭ karto kiu re-
 gule "vojaĝis" registrite, estas do interesa
 Esperanto - filatelaĵo.

La granda R kaj la bordaĵo estas ruĝaj.
 La ciferoj kaj la teksto estas nigraj.

Amouroux



TUTAĴOJ

Ankoraŭ pri la hungara surprisita tutaĵo:

Mi dankas por la rimarkoj sekve de mia noto pri la koncerna tutaĵo, sed, ĉar la konkludoj ŝajnas al mi ne sufiĉe pripensitaj, mi deziras precizigi mian komprenmanieron.



Eĉ post surpriso la koncerna karto ne povas esti konsiderata kiel formularo, absolute ne. Krom la nuligo de la afrankpovo (nun nenecesa) de la enpresita marko (notu ke nur la valoro estas strekita, sed tute ne la marko mem) kaj konfirmo de la nuna poŝtofica servo, nenia formulo adres- aŭ dorsflanka, povus ĝin aspektigi kiel formularo. Ĉiam temas pri ilustrita, poŝta karto kun enpresita marko kun klarigoj ankaŭ en Esperanto. Do, ĝi estas Esperanto-poŝttutaĵo kataloginda kaj kolektinda.

Mi demandas: Kiu karto povus esti pli poŝta ol tiu, kiu servas por la interna uzo de la poŝto?

Saman vidpunkton mi havis, kiam mi skribis, en alia kazo, pri la poŝtkontoraj stampoj aŭ etikedoj. Mi persiste opinias, ke ju pli oficiale uzitaj de la poŝto estas Esperanto-iloj, des pli katalogindaj kaj kolektindaj ili estas, sed kiel mi jam diris, la lasta vorto restas al la kolektanto mem por ilin akcepti aŭ rifuzi.

Mia sento estas, ke s-ro Saget ne katalogis siatempe la koncernan poŝtkarton, tute simple ĉar li ne konis ĝin.

Se ni rigardas la katalogon pri oficialaj poŝtaĵoj kun Esperantotekstoj, kiun redaktis s-ro Saget (speciala eldono de LA INTERLIGILO paĝo 6), ni rimarkas, ke li listigis, kun nr. 3a, la saman karton kiel la mia. Ambaŭ, post la samaj neniigoj havas la saman celon: la internan poŝtan uzon. La sola diferenco estas,



SALATON: VITÓRLÁBOK TITANYIÁL. LAC SALATON: YADITS A TITANY. — LAGO
SALATON: VELEPŐS ÁRÓS TITANYI.

Postaszolgálati úgy.

FELADÓ:

M. kir. Állami Nyomda, Budapest, 1937.

9-12

ke s-ro Saget notas la surpreron per 3 hungaraj vortoj: Tekintetes Nagyságos Méltóságos, (kies signifon mi ne konas), kaj la mia havas: Postaszolgálati ügy = (poŝtofica servo).

Respektante la saman kronologion mia karto devus havi, logike, la numeron 3 b.

Amouroux

-
Red. rim.

Mi devas konfesi, ke mi ne rimarkis tiun lastan numeron "3a" en la katalogo de Saget. Kaj post legado de ĝi mi devas pravigi s-ro Amouroux en tio, ke lia karto devus havi nr. 3 b. Per tiu "konfeso" mi rigardas la diskuton pri tiu afero finita.

Nur poste, kiam mi ricevos de Hungario mension pri la signifo de la 3 vortoj sur la Sageta karto nr. 3a, mi skribos tion. □

Nun AREK'o eniris sian 3-an vivjaron kaj ĝi estas, kiel la angloj kutimas diri: "still going strong".

Nia Informilo kaj nia Stampo-servo evoluiĝis ŝajne al plena kontento de niaj membroj, kaj kiel vi povas vidi de la jarbilancoj sur la lasta paĝo de ĉi tiu numero, ankaŭ nia ekonomia stato estas en ordo.

Fakte ni nun bone povus havi kelkajn plurajn membrojn en diversaj landoj, tiel ke nia novaĵservo povus esti pli bona, se pluraj observantoj servos.

Tial ni denove instigas al niaj nunaj membroj: Se vi havas korespondantojn, kiuj estas interesitaj pri kolektado de Esperantaĵoj, speciale en landoj, kie ni ne estas reprezentitaj bonvolu skribi al nia gvidanto, Ivar Paulsson, pri tio, kaj li povos kontakti ilin, tiel ke viaj amikoj eble poste eniru nian rondon.

Fine mi dankas kore tiujn membrojn, kiuj en la pasinta tempo helpis al mi per sciigo pri diversaj novaĵoj k.c. kaj mi esperas, ke ili ankaŭ estonte helpos por fari "Fenikson" tiel bona kiel ebla.

Reinhold Jensen

Malfacilaĵoj por la Stampo-katalogo !

De s-ro Burmeister venis ĵus nun tre ekscitigan sciigon, kiu nur malbone akordas kun lia lasta raporto, kiu simple diris, ke la katalogo estis preta por presigo kaj volis aperi komence de la jaro 1971.

Okazis tio, ke la presejo nun ne povas okupi sin pri la katalogo en tiu jaro, nur poste en 1972 ĝi povas promesi fari la laboron.

Tial Burmeister spekuladas pri alia aperigmaniero. Nome eldono en du partoj. Unu kajero kun la ilustraĵoj, kaj unu kajero stencilita kun la teksto.

Tio, kompreneble, ne estas bona solvo, sed estas ebla, ke tio tamen estos pli bona ol la daŭra, vana atendo.

Nun Burmeister estas okupata kun esploroj pri kie li povas trovi eblecon por stenciligo.

Eble AREK povus fari tiun parton de la laboro, se absolute ne alia solvo estos trovita. sed oni ja ne povas ne pensi, ke tio estos bedaŭrinda eliro de la katalog-problemo. Ni ja nun dum jaroj streĉe atendis veran, presitan kaj ilustritan katalogon, kaj nun ni devos kontentigi pri verko, kiu similas al la malnova Sta-katalogo tiel multe, ke oni nur povas paroli pri la ĝis-data enlaboro de la multaj aldonoj kaj eble kelkaj korektigoj.

Vere bedaŭrinda afero. Sed ni devas ja armigi nian paciencon.

Espereble ni povos diri pli pri la problemo venontfoje.

JARBILANCOJ 1969 - 1970ArekEnspezoj:

Kasenhavo	
pr. 1.10.69	4,80
37 kotizoj á 6 rkp	155,40
Donacoj: 30 rkp.	21,00

en sveda valuto:	181,20
------------------	--------

Elspezoj:

Fenikso	100,00
Propagando	40,70
Korespondado	
Kasenhavo	
31.12.1970	40,50

	181,20
--	--------

Kurzo: Sveda kr. 1,00 = dana kr. 1,45.

1 int. rkp. sveda ,70 dana kr. 0,90.

Ivar Paulsson

FENIKSO

Kasenhavo 1/10.69	32,45
AREK (100 sv. kr.	144,70
Stampo-Servo	
(173 rkp)	155,70
Biesiada (mankol.)	2,70
Boscarino(mankol.)	3,60

en dana valuto:	339,15
-----------------	--------

Papero	44,70
Koverttoj	14,46
Afranko	75,90
Presinko	28,20
el.stencils	65,64
Stencils	33,15
Div.helpiloj	2,80
Kasenhavo	
31.12.1970	74,30

	339,15
--	--------

Reinhold Jensen

Okaze de la jarŝanĝo mi deziras al ĉiuj bonfarton kaj feliĉon dum 1971.

Ivar Paulsson